VERDAJ VOJOJ ŜLOSILVORTE

La koncepto 'verdaj vojoj' estas ĝenerale kompleksa ĉar ĝi konas multnombrajn nomojn, definojn kaj interpretadojn. Ne ekzistas ununuran definon de la koncepto ĉar ĝi intime rilatas al la historio kaj kulturo de la koncernaj landoj, regionoj. Ĝenerale verdaj vojoj referencas al eksaj transportvojoj por senmotora trafiko.

Ne sufiĉas simple laŭvorte traduki la terminon 'verdaj vojoj' en aliaj lingvoj , ĉar en multaj landoj la koncepto kiel tia ne ekzistas en tiu formo aŭ oni uzas (be.,cz.) alian oficialan terminon. Laŭvorta traduko ne aŭtomate elvokas la saman asociatan enhavon aŭ povos havi tute alian signifon. Tial ankaŭ la esperantlingva 'verda vojo' estas laŭvorta traduko sennacieca, ĉar neniu lando uzas tiun terminon en sia vojoreto kontraste al la anglalingva termino 'greenways'.

verdaj vojoj (eo), voies vertes (fr), vias verdes (es), greenways (en), vie verdi/percorsi verde (it), rusa nomigxas "tropa zdorovja" - "pado de sano" (ru), ryokudoo (jp) ; **bicikloturismo** (eo), vélotourisme (fr), fietstoerisme (nl), cycle tourism (en) ; **biciklo-itinero** (eo), véloroute (fr), fietsroute (nl), Fahradtour (de); **biciklopado** (eo), fietspad (nl); piste cyclable (fr), bike path, cycleway (en), Radweg (de), cyklostezka (cs), cykelsti (dk), **malaktivaj eksaj fervojaj trakoj** (eo) , anciennes voies ferrées désaffectées (fr), old railroad tracks in disuse (en), vecchi traccati ferroviari abbandonati (it), linhas ferroviárias desativadas (pt), antiguos trazados ferroviarios abandonados (sp), stillgelegte ehemalige Bahngleise (de), staré nepoužívané železniční tratě (cs) ; **trenvojo** (eo), chemin de halage (fr), towpath (en), Leinpfad, Treppelweg (de), alaggio/ alzaie (it), jaagpad, tragel (nl), caminho de sirga (pt), trekkveg (no), stezky podél řek (cs) ; **signalaro** (eo), signalisation, balisage (fr) signage (en), bewegwijzering, bebording (nl) ; **liga ĉenero** (eo), chaînon de liaison (fr), verbindingsschakel (nl) ; **bicikla luejo** (eo), bike hire/rental (en) ; fietsverhuur (nl) ; Fahrradverleih (de) ; location de vélos (fr) ; **sablokompaktita tegaĵo** (eo), revêtement en sable compacté (fr), afwerking van verdicht zand (nl) ; **rajlolito** (eo), une assiette (de chemin de fer) (fr), railbed (en).

Livre d'espéranto libre

L'idée de ce livre est qu'après l'avoir lu vous aurez des connaissances de base en espéranto, ce qui vous permettra de lire des textes faciles, de participer à des rencontres d'espérantophones et de commencer à pratiquer la langue avec des personnes d'autres pays, par courriel par exemple.

http://www.ikso.net/fr/libera

Free Esperanto Book

The idea of the book is to teach the basics of the international language Esperanto. Those who have read through the book and done the exercises should have enough basic knowledge of Esperanto to read easy texts, participate in Esperanto events, and begin to use the language to correspond with people from other countries.

http://www.ikso.net/en/libera.

NATURAMIKOJ INTERNACIE

Esperanta Naturamikaro apartenas al la Internacia Federacio de Naturamikoj (NFI). NFI kalkulas pli ol 40 membro- kaj partnero-organizaĵojn en 21 landoj kaj estras ĉ.350 feriodomojn kiujn situas plej ofte en arbaro kaj ofertas malmultekostan tranoktadon. Ĝi estas precipe aktiva en la disvolviĝo de projektoj ĉirkaŭ kulturo, naturprotektado, sporto kaj daŭrigebla turismo. Tiel ekestis ene de tiu federacio internaciaj projektoj kiel la Pejzaĵo de la Jaro, Bluaj Riveroj kaj Verdaj Vojoj. La 'membreco-marko' de la naturamikaro en ĉiuj landoj portas nur la Esperanto-surskribo« LA NATURAMIKOJ »

INTERNACIA FEDERACIO DE JUNAJ NATURAMIKOJ
HTTP://WWW.IYNF.ORG
NATURAMIKA FEDERACIO INTERNACIA
HTTP://WWW.NFI.AT

VERDAJ VOJOJ

VOIES VERTES
TRAGE WEGEN
NJIA ZA KIJANI
VIAS VERDES
GREENWAYS
ECOPISTAS
RAVEL
綠道

Pri kio temas ?

ESPERANTA NATURAMIKARO

www.esperantio.net/ena
naturamik@esperantio.net

verdaj.vojoj@zoho.com
http://eo-naturamikaro.webnode.nl

GREENWAYS
VERDAJ VOJOJ
KRAKÓW•MORAVA•WIEN

Originoj kaj celoj

Verdaj vojoj aŭ «greenways» estas de usona origino.

Verda vojo ne povas esti simple sinonimo por biciklopado aŭ ciklorapidvojo, ĉar ĝi respondu al pli rigoraj normoj rilate al larĝeco, deklivo kaj alireblo por diversaj uzantoj.

Eksaj fervojaj trakoj kaj trenvojoj ofertas enorman potencialon el ekoturisma vidpunkto konforme al novaj sociaj bezonoj : aktiva moviĝo kaj sporto en la la libera aero. Tia reto reprezentas klaran apogon por la bicikla kulturo kaj por la ĝeneraligo de la uzado de bicikloj inter ĉiuj civitanoj, speciale el eduka vidpunkto por gejunuloj. Ĝi estas ankaŭ ilo por senmotoraj dislokigoj inter urboj kaj ilia periferio. Tial en pli kaj pli da landoj oni volas konservi kaj transformi tiujn 'malrapidajn vojojn' por integri ilin en la kreado de reto pro ilia kulturhistoria valoro kaj ilia graveco por la senmotoraj vojuzantoj. Por doni ian markon de kvalito estas uzataj ŝildoj, ne malofte kun la angla nomo '***greenway***' : *verda vojo* (eo), '*voie verte' (fr)*, '*vía verde' (it)*, '*zielona szla'k* (pl), '*zold utak'* (hu).

Unika koncepto de memstaraj vojoj ekskluzive* por senmotora trafiko kaj favora al ekoturismo.

"Verda" ĉar ĝi rilatas ne nur al kulturhistoriaj kaj arkitekturaj aspektoj sed ankaŭ al aspektoj de naturprotektado kaj de la pejzaĝo. "Verda" ĉar ĝi ne estas nur la koloro de la espero kaj de Esperanto, sed ankaŭ la koloro de vizieca perspektivo rilate al daŭripova turismo.

Impulso al kampara disvolviĝo kaj al turismo en rilato al la natura aŭ kultura heredaĵo : tranoktejoj, trinkejoj, biciklopruntejoj, ekomuzeoj, ofte tra naciaj politikaj programoj por kreado de laborpostenoj kaj novaj formoj de aktiva kaj kvalita turismo.

Allogaj kvalitoj

- **Sekureco**: nur por biciklantoj, promenantoj, (tabul)rulsketantoj kaj eĉ ĉevaloj sub certaj kondiĉoj. Aŭtoj, motorcikloj kaj alia motora trafiko principe* ne rajtas uzi tiujn vojojn. Tial verdaj vojoj eleminas la daŭran riskon de trafikakcidentoj por ĝiaj uzantoj.

Temo verdaj vojoj sur libroj kaj DVD

* krom esceptaj permesoj por liverado de varoj, riparado de riverbordoj,…)

- **Facileco** : optimumi la kvalitajn ecojn de fervojaj trakoj kaj trenvojoj, kiuj jam havas malmultajn kurbojn kaj deklivojn, eĉ pli faciligas fizikan strečon por la uzantoj de verdaj vojoj.

- **Ŝildoj** per kiuj rekoneblas tiaj vojoj, samkiel trafikrestriktaj ŝildoj kaj turismaj informtabuloj.

La sistemo de verdaj vojoj donis en diversaj landoj kialon por **premioj** ('Greenway Award') sur nacia kaj eŭropa nivelo, MOT, ConBici... En januaro 1998 kreiĝis en Belgio la ***Asocio de eŭropaj verdaj vojoj*** **(AEVV).**

Aktiva feriado

La asocioj ***Dynamobile*** kaj ***Alterrondo de Francio*** organizas ĉiujare gvidatajn internaciajn biciklo-feriojn por la tuta familio dum kiu oni uzas verdajn vojojn en foje historia, ekologia kaj kultura kadro tra arbaro kaj kamparo. En Ĉeĥio ankaŭ eblas mendi gvidatajn ekskursojn sur la ĉeĥaj verdaj vojoj (individue kaj grupe) pere de

Fontoj kaj retligoj :

- **Eŭropa Asocio de verdaj vojoj (en,fr,es)** http://www.aevv-egwa.org
- **Verdaj vojoj en la mondo (eo)** http://www.esperantio.net/vvelm
- **Alterrondiro de Francio (pdf)** http://eo-naturamikaro.webnode.nl
- www.dynamobile.net **(fr, nl)**
- **Greenways Travel Club - CZ (en)** http://www.visitgreenways.com/